

# Invito al la kongreso

Elkore mi invitas vin al la 10-a kongreso de EEU en Rijeka, Kroatio, kiu okazos de la 6-a ĝis la 12-a de julio 2014. Kroatio estas la plej nova membroŝtato de EU kaj havas verŝajne la plej fortan tradicion de Esperanto inter ĉiuj EU membroŝtatoj. La jugoslavia eksprezidanto Tito, kroato, parolis Esperanton, kaj aŭspiciis UK-on en Zagrebo en 1953 kaj kroata ŝtatprezidanto Stjepan Mesić aŭspiciis UK-on en Zagrebo en 2001. En Kroatio esperantistiĝis esperantistaj famuloj kiel Ivo Lapenna kaj Tibor Sekelj kaj de tie devenas multaj aliaj gravaj agantoj por la internacia E-movado. De tie devenas Zagreba Metodo de instruado de Esperanto, 90% de teatraj aktivadoj en Esperanto kaj granda daŭra informado pri Esperanto al la ĝenerala publiko.
Dum 2013 en Bruselo estis interesa ekspozicio fikcia pri la eksplodo de EU en 2018 kun subtitolo “La Lastaj Jaroj de la Longa Paco 1945-2018”. Kvankam la flandra artisto kiu konceptis kaj preparis la ekspozicion, Thomas Bellinck, estas neesperantisto, la ĉefa lingvo de ĝi estis Esperanto. Ĝia ideo estis ke EU eksplodis ĉar la junularo, kiu eĉ ne povis imagi militon en Eŭropo, pli kaj pli voĉdonis por ekstremaj naciistaj partioj, kiuj tiris Eŭropon en novan grandan militon. Post tiu milito, pli da homoj fine komprenis la neceson de politika integriĝo en Eŭropo, kaj de neŭtrala lingvo por finfine garantii la pacon. Pensiga ekspozicio por sproni viglan debaton dum la kongreso en Rijeka!
Krom tio atendas vin viglaj diskutoj pri la plej efika maniero antaŭenigi Esperanton en la 28 membroŝtatoj de EU, atendas vin aro da kulturaj programeroj en la bela ĉemara urbo Rijeka kiel teatraj spektakloj, koncertoj, poeziaj vesperoj, libroprezentoj. Kompreneble en tia bela ĉirkaŭaĵo, en unu el la plej famaj turismaj regionoj de Kroatio, atendas vin ankaŭ pluraj ekskursoj, ĉemaraj kaj montaraj.
Venu kaj kontribuu, ĝuu kaj lernu!

Seán Ó Riain, prezidanto de EEU

# Bonvenon en Rijeka



Rijeka estas urbo situanta en norda parto de kroatia adriatika marbordo. Ĝi estas la ĉefa havenurbo kaj la tria urbo laŭ grandeco en Kroatio, havante ĉirkaŭ 140.000 loĝantojn. Ĝi situas en grava loko kie la Adritika maro plej multe eniras la Eŭropan kontinenton, pinte de la Kvarnera golfo. Pro tio la riĉa historio de la urbo estas ligita al maro. Urba ekonomio grandparte dependas de la mara trafiko kaj ĝis antaŭ nelonge de ŝipkonstruado. Intertempe ĉiam pli ankaŭ de turismo. Tamen la plej esenca por la urba historio estis ĝia haveno kiu dum la tuta aŭstro-hungara periodo de 15-a jarcento estis dua plej grava haveno de la tuta Aŭstro-Hungara regno kaj tiel en la19-a jacento estis unu el la dek plej grandaj havenoj de Eŭropo. El tiu tempo devanas ankaŭ la tipa konstrustilo de Aŭstro-hungara monarkio, netipa por kroata marbordo.



En la urbo videblas influoj de multnombraj kulturoj kaj nacioj. Rijeka ankoraŭ hodiaŭ estas urbo de toleremo kaj kunvivado, la urbo en kiu bone vivas pli ol 10 naciaj minoritatoj. Tion bone montras ankaŭ la plej nova arkitektura perlo de Rijeka: komence de 2013 malfermita estis islama centro de Rijeka, konstruita laŭ projekto de unu el la plej famaj kroataj skulptistoj Dušan Džamonja.
Eĉ se Rijeka mem ne estas unu el la ĉefaj turismaj celoj ĉe la kroatia marbordo, la regiono ĉirkaŭ Rijeka apartenas al la plej pitoreskaj ĉemaraj regionoj de Kroatio, kiu jam tre frue en la 60-aj jaroj iĝis unu el la ĉefaj turismaj celoj en Kroatio. Rijeka estas administra centro de departamento Primorsko-goranska županija, kies nomo jam multon diras pri ĝia aspekto – Ĉemara montara departamento. Al ĝi apartenas unufanke la Kvarnera marbordo kaj insuloj de la Kvarnera golfo: Krk, Cres, Rab, Lošinj kaj pliaj malgrandaj insuloj. Aliflanke la regiono Gorski kotar estas unu el la plej sovaĝaj kaj belaj montaraj regionoj de Kroatio, kie vivas interalie preskaŭ triono de ĉirkaŭ mil ursoj vivantaj en Kroatio. Rijeka ankaŭ estas la enirpordo al la Istria dunoinsulo kun ĝiaj belegaj ĉemaraj urboj kaj  la eĉ pli speciftipaj montetopintaj urbetoj en ĝia interno, sur ruĝa tero, inter olivejoj kaj vinberejoj.









# Mapo de Kroatio



## Antaŭkongreso, postkongreso kaj kongresaj ekskursoj



Programoj por antaŭ-, post- kaj dumkongresaj ekskursoj estos pretigitaj dum somero kaj aŭtuno 2013. Itineroj kaj aliĝiloj por antaŭ- kaj postkongresoj kaj parte por dumkongresaj ekskursoj estos publikigitaj en la kongresa retejo: http://eeu-kongreso.webnode.com/
Planataj estas eksursoj en la Kvarnera regiono, la montara regiono Gorski kotar kaj al Istria duoninsulo. Vi do jam povas antaŭĝoji kaj plani iom pli longan restadon en unu el la nature plej belaj regionoj de Eŭropo.



En ĉemaraj urbetoj de Istrio vi povas ĝui belan marbordon kaj verdan internon de la duonisluo kun arbaroj, vinberejoj kaj olivejoj, multaj promen- kaj biciklaj vojoj inter mezepokaj montopintaj urbetoj, ŝtonaj vilaĝoj kaj restoracioj kun Istriaj subteraj fungoj trufoj.
En la Kvarnera insularo troviĝas belegaj, tute malsamaj insuloj: de karsta Krk, tra arbara Cres kun mediteraneaj kverkoj kaj urbeto Lubenice, kies plaĝo ofte estis elektata inter la 10 plej belaj de la mondo, verda insulo Lošinj kaj sablaj plaĝoj de la insuloj Rab kaj Susak. La plej suda insulo Pag imponas per sia „luneca pejzaĝo“ kie la maro iĝas eĉ pli blua kontraste al banka kalkŝtono.



Norde de la 145 kilometojn longa kaj 1757 m alta monto Velebit komenciĝas arbaroj de Gorski kotar kaj Lika, belega regiono kun tipe karstaj blankaj rokegoj, bluverdaj riveroj kaj lagoj, inter kiuj la plej famaj certe estas la UNESKO -protektitaj Lagoj de Plitivice. La tuta ragiono estas riĉa je maloftaj besto- kaj plantospecoj, interalie Eŭropaj linkoj, lupoj kaj ursoj.

## Kongreskotizoj

**Kategorio A**
Malnovaj EU-landoj: membroj de EU antaŭ 2004, Svislando, Norvegio, Islando

| Aliĝo ĝis | Prezo |
|---|---|
| la 31-a de oktobro 2013 | 80 € |
| la 31-a de decembro 2013 | 95 € |
| la 31-a de marto 2014 | 120 € |
| post la 31-a de marto 2014 | 140 € |

**Kategorio B**
Ĉiuj aliaj landoj kaj gejunuloj ĝis 25-jaraĝaj

| Aliĝo ĝis | Prezo |
|---|---|
| la 31-a de oktobro 2013 | 60 € |
| la 31-a de decembro 2013 | 70 € |
| la 31-a de marto 2014 | 90 € |
| post la 31-a de marto 2014 | 110 € |

**Informoj pri loĝeblecoj kaj aliĝoj ĉe:**
**www.europo.eu**
**http://eeu-kongreso.webnode.com/**


# 10-a kongreso de EEU - 2014




## 6-a - 12-a de julio 2014

**Justa Eŭropo kun justaj lingvaj rilatoj, malmultekosta demokratia komunikado**

**Pli da informoj:**
**www.europo.eu**
**http://eeu-kongreso.webnode.com/**





## Rijeka - Kroatio